# La vokala sistemo de la litova lingvo kaj Esperanto

*Aida Čižikaitė*

## Antaŭparolo

Mia denaska lingvo estas la litova. Ĝi estas tre valora por multaj lingvistoj kaj diversaj kampoj de lingvoesplorado. Ĉu estas io interesa en la fonetiko de la litova lingvo? Jes.

Tio estas la **vokala sistemo** de la lingvo.

Multajn sonojn ĝi heredis el la hindeŭropa pralingvo. Kompreneble, ĝis la nuna tempo tiuj evoluis kaj aperis la nuntempa vokala sistemo de la litova lingvo, kiu estas sufiĉe komplika.

Mi volas ne nur prezenti la nunan vokalan sistemon, sed ankaŭ montri, kiamaniere ĝi evoluis de la hindeŭropa pralingvo. Tiu historia trarigardo povas multon klarigi kaj povas esti interesa. Malmultaj nuntempaj hindeŭropaj lingvoj konservis tiom da antikvaj ecoj kiom la litova. Kaj de speciala intereso estas kompari la vokalan sistemon de tiu ĉi nacia lingvo kun la vokala sistemo de planlingvo.

## Enkonduko

Kiam ni aŭskultas paroladon, ni rimarkas, ke lingvo konsistas el sonaj pecoj, kiuj estas diversaj laŭ longeco kaj kvalito. La plej mallonga sona peco (kaj kombine kaj kiel sona unuo de la lingvo) estas sono. El sonoj ni faras silabojn.

Fonetiko estas la scienco pri sonaj rimedoj de lingvo, kaj unue pri lingvaj sonoj. Lingvaj sonoj estas komplikaj tiurilate, ke ĉiuj el ili samtempe havas kaj fizikajn (akustikajn) kaj fiziologiajn kaj sociajn (lingvajn) ecojn. Do, ne estas facile kongruigi la tri vidpunktojn de studado de sonoj — la fizikan, fiziologian kaj lingvistikan.



Tamen estas sendube, ke, studante sonojn laŭ lingvistika vidpunkto, ni devas pensi ankaŭ pri ilia fizika kaj fiziologia esenco. Lingvisto ne povas ne scii la fizikajn ecojn kaj karakterizojn de la farado de lingvaj sonoj. Tiukaze la scienco pri lingvaj sonoj (fonetiko) disiĝas: apud **funkcia fonetiko** aŭ **fonologio**, kiu esploras la socian uzadon de lingvaj sonoj en la komunika procezo, estas kaj **artikulacia fonetiko**, kiu interesiĝas pri la fiziologio de la apero de lingvaj sonoj, kaj **akustika fonetiko**, kiu interesiĝas pri la fizikaj ecoj de la sonoj (karakterizoj). Dum praktika esplorado de lingvaj sonoj, ne necesas severe malproksimigi fonologion, artikulacian kaj akustikan fonetikon; ofte estas tiel, ke la fonologia, akustika kaj artikulacia vidpunktoj kuniĝas, unu la alian plifortigas kaj subtenas. Fonologo, studanta lingvosonojn kiel socian fenomenon en la parola agado kaj lingva evoluo, kutime apogas sin al datumoj pri la fizika kaj fiziologia esploradoj de lingvaj sonoj. Kaj fonetikisto-akustikisto kaj fonetikisto-fiziologiisto ne povas ne atenti la ĝeneralajn fonologiajn (lingvistikajn) ecojn de la lingvosonoj.

Tiamaniere aperas la neceso konatiĝi kun la elementaj, bazaj demandoj de la fiziologio kaj akustiko de lingvosonoj, same kiel kun la konsisto kaj agoj de la lingva aparato.

Lernante denaskan kaj fremdajn lingvojn, oni povas imagi la klasifikadon de lingvaj sonoj (fonemoj). Kio estas la fundamento de tiu ĉi klasifikado, kiujn ecojn oni atentas disigante ilin?

Ni klasifikas ne ajnajn elparolitajn kaj aŭdeblajn sonojn, sed lingvosonojn, fonemojn. Kaj fonemoj estas parolaj, sociaj faktoj. Sekve, la klasifikado de lingvosonoj estas lingvistika: klasifikante sonojn, unue ni atentas la disigajn ecojn de fonemoj. Sed fonemoj estas realaj fizikaj faktoj, kiujn kreas la parolaparato, tial, kompreneble, konstatante limojn de fonemoj, ni ilin markas kaj klarigas – kaj fizike kaj fiziologie – per klasifikaj terminoj. Sekve ni atentas ne nur la sociajn sed ankaŭ la fizikajn kaj fiziologiajn ecojn de sonoj.

Fonemo konsistas el voĉo (sonorado de specifa alteco) kaj bruo (sonorado de nedifinita alteco). Kaj jen h – en iuj fonemoj dominas ne bruo sed voĉo, en aliaj ne voĉo sed bruo. Laŭ la rilato inter bruo kaj voĉo, ĉiujn sonojn oni disigas en du grupojn – sonoraj aŭ voĉaj (ltn. *sonorus* 'voĉa, sonora') kaj senvoĉaj. Inter la voĉaj sonoj dominas vokaloj, kiuj estas preskaŭ sen brua kromo, al la sonoraj sonoj oni alkalkulas ankaŭ konsonantojn [l], [n], [r], [m]; dum <[j], [v]>

okupas mezan pozicion. Kontraŭ la voĉaj konsonantoj kontraŭstaras senvoĉaj konsonantoj, en kiuj estas pli da bruo ol voĉo.

Ĉiujn sonojn de la homa parolo ekde antikvaj tempoj (de tiam, kiam oni komencis esplori ilin) oni disigas laŭ du grupoj: **vokaloj** (*vocales*) kaj **konsonantoj** (*consonantes*).

Vokaloj estas tiuj sonoj, kiujn oni prononcas kun malfermita buŝo kaj en kiuj dominas tono, voĉeco (ekz. **a, o, u, ė**). La artikuladon de vokaloj, dum ni prononcas ilin, karakterizas: 1) el pulmoj iranta aero ne renkontas barojn: la aero senĝene trairas la buŝan kavon; 2) ĉiuj pecoj de la lingva aparato estas en samanivela streĉo kaj 3) la aera elblovo estas malforta (tion kontroli estas facile per la mano metita ĉe la buŝo).

## La vokala sistemo de la litova lingvo

La vokala sistemo de la litova lingvo estas komplika. Ni havas kaj vokalojn kaj diftongojn. Vokaloj estas longaj kaj mallongaj. Ankaŭ diftongoj estas duspecaj: puraj (duvokalaj) kaj miksitaj (miksitaj dusonaj).

En la dialektoj estas eĉ pli da diverseco. Abundas multaj sonoj de diversaj "transiraj" (mezaj) tipoj. Apud longaj kaj mallongaj vokaloj ekzistas ankaŭ duonlongaj, kaj multe da interkvalitaj sonoj. La plej manifesta eco de la litovaj vokaloj: ekzistas vokaloj de duopa longeco (longaj kaj mallongaj). Ili estas diversaj fonemoj, sed ne poziciaj variantoj de la fonemoj. La longeco kutime ne dependas de la akcento. Longajn kaj mallongajn vokalojn oni jam disigis en la hindeŭropa pralingvo. La opozicio de tiuj ĉi vokaloj estas tre antikva fonetika eco de nia lingvo, kiun ne sukcesis konservi multaj nuntempaj vivantaj hindeŭropaj lingvoj.

### Mallonga trarigardo de la vokaloj

La vokalismo de la malfrua periodo de la hindeŭropa pralingvo verŝajne konsistis el kvin mallongaj vokaloj **i, e, a, o, u** kaj kvin longaj vokaloj **i, e, a, o, u** kaj unu reduktita vokalo de neklara kvalito *∂* (ŝva):

**i** **u**
*∂*
**e** **o**
**a**



La pli malfermitaj **e, a, o** kun la fermitaj **i, u** faris samsilabajn kunmetaĵojn:

**ei** **oi** **eu** **ou**
**ai** **au**

En junto de morfemoj pro vokala kontraho la unua parto de la diftongo estis longa **ēi, ōi, ēu, ōu** (pri **āi, āu** oni dubas). Ili kutime troviĝis en finaĵoj de vortoj. La vokaloj **a, e, o** povis fari samsilabajn kunmetaĵojn kun fluaj kaj nazalaj konsonantoj **r, l, m, n**. Tamen tiuj kunmetaĵoj devis esti neoftaj.

En la radikoj de vortoj kaj morfemoj ekzistis ŝanĝiĝo de la vokaloj. Radiko aŭ morfemo, havanta mallongan **e** (normala grado de la vokala ŝanĝiĝo), ricevadis ankaŭ varianton kun mallonga **o** (resono de normala grado). Tio konsistigas fundamentan ŝanĝiĝon de vokaloj, kiu restis. La vokalismo de radiko kaj morfemo daŭre plimalfortiĝis kaj malaperis (malforta, malaperanta grado de vokalismo), povis ankaŭ plilongiĝi (kvanta ŝanĝiĝo de vokaloj) — ricevadis **ē** (plilongigita normala grado) kaj **ō** (ĝia plilongigita resono).

La ŝanĝiĝo de vokaloj okazas ne nur en malferma silabo, sed ankaŭ en samsilabaj kunmetaĵoj. Tiukaze kiel malforta grado estis sonantoj **u, i.**

**ei : oi i ēi : ōi**
**eu : ou u ōu : ōu**
**eR : oR R ōR : ōR**

En la nuntempa lingvo ne ĉiuj radikoj konservis ĉiujn gradojn de vokala ŝanĝiĝo. Oni pensas, ke en la hindeŭropa pralingvo ekzistis radikoj, kie fundamentan ŝanĝiĝon konsistigis **a : o**. Sed tia ŝanĝiĝo estis rara, ĉar la fonemo **a** estis malofta. Iomete pli ofta estis ŝanĝiĝo, kiam kiel fundamenta grado estis **e, a, o**; en malforta grado kutime estis *∂* (*ŝva*).

La ŝanĝiĝo de vokaloj estis kunligita kun gramatikaj formoj. La apero de tiu ĉi ŝanĝiĝo ankoraŭ ne estas sufiĉe esplorita. La aperon de baza ŝanĝiĝo **e : o** iuj klarigas per moviĝo de la akcento en pli frua epoko de la pralingvo, aliaj kunligas ĝin kun malsama medio de aliaj sonoj k.s.

La aperon de la malforta grado oni kunligas kun malfortiĝo kaj malapero de vokalismo en senakcenta pozicio. Tion montras *ŝva*, aperanta kiel malforta grado de longaj vokaloj. Mallonga reduktita vokalo neniam estas akcentata. Tia malfortiĝo kaj eĉ malapero de vo-

kaloj okazas nur en lingvoj havantaj fortan "elspiran" (emfazan) akcenton.

La deveno de plilongigitaj gradoj estas neklara. Povas esti, ke ĝi dependis de diversaj faktoroj kaj okazis ne en la sama tempo. La unuaj esploristoj ĝin kunligas kun la malapero de laringalaj (gorĝaj) sonoj, havitaj en pli frua periodo. Malaperantaj ili transformis **e** al longaj **ē, ā, ō** kaj en la pozicio antaŭ **e** donis trispecajn refleksojn de mallonga vokalo.

Sekvas konkludo ke la hindeŭropa pralingvo havis ununuran vokalon **e** (**eu, ei** — nur malforta grado de ŝanĝiĝo de diftongoj). Tamen, tio estas preskaŭ nekredebla, ĉar nuntempe, ŝajne, ne ekzistas lingvoj, havantaj ununuran vokalon, kaj pralingvo ne povis havi ecojn, kiuj ne ekzistas eĉ en unu lingvo.

## Tipoj de vokaloj

### Mallongaj

La litova lingvo havas kvar hereditajn mallongajn vokalojn: **a, e, u i**. **U, i** ĉiukaze estas mallongaj (ĉu akcentitaj ĉu neakcentitaj). Ili plilongiĝas nur en dialektoj. Tamen **a, e** ofte plilongiĝas ankaŭ en la komuna lingvo. Tiu ĉi plilongiĝo estas duavica. Tamen en kelkaj kazoj ankaŭ ili eĉ neakcentitaj restas mallongaj. Ili estas antikvaj mallongaj vokaloj.

### Longaj

Hereditaj longaj vokaloj de la litova lingvo estas kvar (skribe ni notas ilin **o, ė, y, ū**). En nuntempa lingvo longaj estas ankaŭ nazalaj **ą, ę, į, ų**, kiuj devenas el diftongoj kun **n**. Nun ilin ni prononcas sen ajna nazala resono. Longaj **y, ū** kaj nazaldevenaj (nun ni skribas **į, ų**) jam estas entute samaj. **Ą, ę** estas longaj kaj akcentataj kaj ne, kaj **a, e** neakcentataj restas mallongaj, akcentataj plilongiĝas, tamen ne atingas la longecon de **ą, ę**.

### Nazalaj

**Ą, ę, į, ų** nun ni prononcas samkiel **a, e, i, u**. En antikvaj tempoj ili estis prononcataj tra la nazo. Nazalaj **ą, ę, į, ų** plej frue perdis la nazalan resonon (estis sennazaligitaj), kiam plimallongiĝis finaĵoj.

Oni pensas, ke la plej frue sennazaligitaj estis **ų, į**, kaj nur poste **ą, ę**. La nazalaj vokaloj evoluis el pli malnovaj taŭtosilabaj (t.e. samsilabaj) kunmetaĵoj kun **n** (post malapero de **n**, la vokalo restis nenazala, do pura). La longecon de tiuspeca vokalo oni markas per naz-



ala litero (kun vosto). Tio ĉi estas kompensa plilongiĝo de la vokalo — ke radiko aŭ morfemo restu longa. En la litova lingvo ni havas ne nur longajn vokalojn, devenajn el **an, en, in, un**, sed ankaŭ konservitajn neŝanĝitajn miksitajn diftongojn. La duobla sorto de antikvaj **an, en, in, un** dependis de la pozicio en la vorto. Neŝanĝitaj miksitaj diftongoj restis antaŭ plozivaj konsonantoj. Antaŭ aliaj (neeksplodivaj) konsonantoj kaj en la absoluta fino de la vorto ili transformiĝis al longaj vokaloj. La leĝon de distribuo de nazalaj vokaloj kaj miksitaj diftongoj neatentas nur la prepozicio kaj prefikso **į**. Do, **į** oni enkondukis ankaŭ antaŭ plozivoj, kie laŭleĝe devis resti **in**. La leĝon ne atentas ankaŭ formoj de estonta tempo.

### Diftongoj

La litova komuna lingvo havas ses purajn kaj dek-ses miksitajn diftongojn. Ĉiuj ili povas esti de ambaŭ intonacioj. En malnovaj tempoj en dialektoj estas pli da diftongoj (ekz. ĵemajtoj havas **ou, om**). Oni pensas, ke hindeŭropanoj havis ankaŭ longajn diftongojn, la unuaj elementoj de kiuj estis longaj vokaloj. Tamen ili sufiĉe frue komencis malaperi kaj iĝi monoftongoj, aŭ post mallongiĝo de la unua elemento, ne plu diferencis de la lastaj.

### Puraj

En la komuna litova lingvo ni havas ilin ses. Oni distingas koincidajn **uo, ie** kaj kunmetitajn **ai, au, ei, ui**. La unuaj memorigas longajn vokalojn, havas neklarajn elementojn. La elementoj de la duaj estas klaraj.

### Miksitaj

Ili estas samsilabaj kunmetaĵoj, kiuj konsistas el mallongaj vokaloj kun **r, l, m, n**. Ili havas du intonaciojn. De la intonacio dependas la kvanteco de iliaj elementoj (ekz. *kaunas* = batalas, *Kaunas* = nomo de urbo).

## La vokaloj

**a :** Al la litova **a** konformas en la prusa kaj la latva lingvoj same **a** (lit. *ašis*, lat. *ass*, pr. *assis* -'akso'). Balta **a** konformas al slava **o** (lit. *ašis* mn. sl. *osь*). La balta **a** kaj la slava **o** havas duspecan devenon: unuakaze ili evoluis el pli malnova mallonga ***a**, aliakaze el mallonga ***o**.

La deveno de ***a** en kelkaj vortoj povas esti el pli malnova reduktita hindeŭropa vokalo, kiun lingvistoj markas *ə* kaj nomas "hindeŭropa

*ŝva*". La baltoj kunmiksis la hereditajn hindeŭropajn ***a** kaj ***o** al unu **a**, kaj slavoj tie ĉi havas **o**. En kiuj vortoj la litova **a** devenas de la hindeŭropa ***a**, en kiuj el ***o**, tion nun diveni eblas nur komparante kun ekvivalentoj de tiuj hindeŭropaj lingvoj, en kiuj ***a** kaj ***o** ne estas kunmiksitaj, kiel ĉe vokala ŝanĝiĝo de la litova lingvo. En la hindeŭropa pralingvo (ekz. lit. *akis*, lat. *acs*, pr. *ackis*, mn.sl. *oko*, ltn. *oculus* — 'okulo') ***o** ŝanĝiĝis kun ***e**, tamen ***a : *e**-ŝanĝiĝo plej verŝajne ne ekzistis. Pro mallongiĝo de la fino de vorto, en niaj finaĵoj ĝi povas deveni el longa **a** kaj nazala **ą**.

**e :** La litova **e** konformas en la latva kaj prusa lingvoj ankaŭ al **e** (lit. *medus*, lat. *medus*, pr. *meddo* — 'mielo'). La balta mallonga **e** konformas al **e** de aliaj hindeŭropaj lingvoj en plej malnovaj lingvaj monumentoj (lit. *medus*, mn.sl. *medъ*, skr. *madhu*). Pro mallongiĝo de la fino de vorto nia **e** en finaĵoj povas deveni el longa **e** kaj nazala **ę**.

**i :** La litova **i** konformas en la latva kaj prusa lingvoj ankaŭ al **i** (lit. *iš*, lat. *iz*, pr. *is* — 'el'). La balta **i** konformas al slava **ь** (*jerto*) (lit. *visas*, mn.sl. *vьsь* — 'tuta'). La deveno de balta **i** kaj slava **ь** estas duspeca. Unuakaze al ili same konformas **i**, en aliaj kazoj la konformaĵoj estas diversaj. Tiuspeca **i** staras antaŭ (rare post) **r, l, m, n** kaj ŝanĝiĝas el **e** kaj **a**. Al ĝi komencon donis antikvaj hindoeŭropaj silabaj sonoj (same kiel vokaloj ***r, *l, *m, *n**). La baltoj ilin transformis al miksitaj diftongoj. Same agis ankaŭ la slavaj prauloj (ekz. lit. *likti*, lat. *likt*, ltn. *re-lictus*, skr. *riktas* = 'resti'). Pro mallongiĝo de fino de vorto nia **i** en finaĵoj povas deveni el longa **i** kaj diftongo **ie**.

**u :** Al la litova **u** konformas same **u** en la latva kaj la prusa lingvoj (lit. *rugys*, lat. *rudzis*, pr. *rugis* — 'sekalo'). La balta **u** konformas al slava **ъ** (*jerto*). Konformaĵoj de la balta **u** kaj slava **ъ** en plej malnovaj lingvaj monumentoj de aliaj hindoeŭropaj lingvoj estas duspecaj. Plej ofte al ili konformas **u** (greka **υ**). Tiukaze **u** kaj **ъ** devenas el hindeŭropa ***u** (ekz. lit. *budėti*, lat. *budinat*, pr. *bude*, mn.sl. *bъdeti* — 'deĵori'). Tiudevena nia **u** povas ŝanĝiĝi al diftongo **au**. En maloftaj kazoj antaŭ **r, l, m, n** komencon al tiuj ŝanĝoj donis silabaj ***r, *l, *m, *n**. Tiuspeca **u** ŝanĝiĝas al **a (e)**. Pro mallongiĝo de la fino de vorto nia **u** en finaĵoj povas deveni el longa **ū** aŭ diftongo **uo**.

**o :** Al la litova **o** konformas la latva **a**, prusa **a** aŭ **ū**, en la vortareto de *Elbling* **o** aŭ **oa** (lit. *motina*, lat. *mate*, pr. kateĥisma *mūti*, *Elb. mothe* ='patrino'). La latvaj kaj prusaj konformaĵoj devenas el la balta ***a.** Al la balta **a** konformas slava **a** (lit. *motina*, mn.sl. *mati* 'patrino'). En



ĝermanaj lingvoj la hindoeŭropa ***a**, same kiel ankaŭ en la litova, transformiĝis al **o** (poste **uo**), en la greka **e (η)**. Kompare antaŭnelongan transformiĝon de malnova **a** al **o** en la litova lingvo montras slavaj pruntaĵoj (*isvodba – свадьба* – 'edziĝfesto').

**ė :** Al la litova **ė** konformas latva **ē**, prusa **e** (en II kaj III kateĥismoj **ē** transformiĝis al **ī**) (lit. *sėti*, lat. *set*, pr. (*Elb.vort.*) *semen* – 'semi'). La litovan **ė** oni devenigas el balta ***ē** – larĝa aŭ mallarĝa – (konkludo ankoraŭ nedecidita, ĉar la datumoj estas kontraŭdiraj: ju pli oriente des pli la vokalo larĝiĝas). La latvoj havas larĝan kaj mallarĝan **ē** (kiuj en dialektoj transformiĝas al **ie** kaj **a** ). En dialektoj de la prusa lingvo unufoje estiĝis mallarĝa, aliafoje larĝa. Al la balta **ē** konformas la slava **e**. Aliaj hindeŭropaj lingvoj montras devenon el hindeŭropa ***ē** (lit. *žvėris*, mn.sl. *zverь* = 'sovaĝa besto').

**y:** Al la litova **y** konformas la latva kaj prusa **ī** (en kateĥismoj **ei**) (lit. *gyvas*, lat. *dzivs*, pr. (III kat.) *geiwans* — 'viva'), kiujn oni devenigas el balta ***ī**. Al la balta **ī** konformas slava **i** (lit. *gyvas*, mn.sl. *živь*).

**ŭ :** Al la litova **ū** konformas latva kaj prusa **ū** (en kateĥismoj **ou**) (lit. *būti*, lat. *būt*, pr. (III kat.) *būton>boūton* — 'esti, ĉeesti'). Oni devenigas ilin el balta ***ū**. Al balta **ū** konformas slava **ы** (lit. *būti*, mn.sl. *byti*). Datumoj de aliaj hindeŭropaj lingvoj montras devenon el hindeŭropa ***ū**.

**Fonologiaj skemoj**

Oni pensas, ke la hindeŭropa pralingvo en antikva periodo (t.e. antaŭ la disiĝo) havis jenan vokalan sistemon:

**i** **u**
**e** **o**
**a**

Diftongoj:

**ei** **oi** **eu** **ou**
**ai** **au**

Krome ekzistis samsilabaj kunmetaĵoj de la sama tipo kun **r, l, m, n**, ankaŭ same silabaj **r, l, m, n**.

Post transformiĝo de hindeŭropaj **o, oi, ou** al **a, ai, au** kaj de hindeŭropaj silabaj **r, l, m, n** al **il, im, in, ir / ul, um, un, ur** la vokala sistemo de la balta pralingvo devis aspekti tiel:

**i** **u**
**e** **(o)**
**a**

Diftongoj:

**ei** **(oi)** **eu** **(ou) (?)**
**ai** **au**

Krome ekzistis samsilabaj kunmetaĵoj de la sama tipo kun **r, l, m, n**.

En kelkaj kazoj la orientaj baltoj transformis la diftongon **ei** al monoftongo **ē,** la diftongon **eu** ili kunmiksis kun **au**, kaj post perdo de longaj diftongoj kaj apero de **(?)ui**, la malnova vokala sistemo devis transformiĝi tiel:

**i** **u**
**e** **o**
**e** **a**

Diftongoj:

**ui (?)**
**ei**
**ai** **au**

Krome ekzistis taŭtosilabaj kunmetaĵoj kun **r, l, m, n**.

Intertempe la fonemo **ē**, malproksimiĝante de **ē** diftongiĝis: transformiĝis al diftongoido (koincida diftongo) **ie**, kune altiranta ankaŭ paralelan **ō**, kiu transformiĝis al diftongoido **uo**. Iliajn lokojn okupis fonemoj, kiuj havis la tendencon mallarĝiĝi kaj transformiĝis al la nuntempaj vokaloj **ė** kaj **o** kaj postlasis liberan lokon por novaj monoftongoj **ā, ē** disvolviĝintaj el **ą, ę < an, en**, same ankaŭ pro la akcento plilongiĝintaj malnovaj mallongaj **a, e**.

Tiamaniere disvolviĝis la vokala sistemo de la nuntempa komuna litova lingvo:

**i** **u**
**ie** **uo**
**ė** **o**
**e** **a**



Diftongoj (kunmetitaj):

**ei** **ui**
**ai** **au**

Miksitaj diftongoj: **a, e, i, u + r, l, m, n**.

**Rekonstruado de vokaloj** (lie = litova, bl = balta, ide = hindeŭropa)

lie. i < bl *i < ide *i
lie. ŭ < bl *u < ide *u
lie. e < bl *e < ide *e
lie. a < bl *a < ide *a, o
lie. ī < bl *ī < ide *ī
lie. ū < bl *ū < ide *ū
lie. ie < bl *e <bl *ei (parto restis konservitaj) < ide *ei/ēi
lie. ō < bl *ā < ide *ā
lie. ė < bl *ē < ide * ē
lie. uo < bl *ō < ide *ō/*ōu
lie. ē < ę < bl *en < ide *en
lie. ā < ą < bl *an < ide *an

## La vokala sistemo de Esperanto

La fonetika sistemo de Esperanto, same kiel de ĉiuj aliaj lingvoj, konsistas el vokaloj kaj konsonantoj. Ekzistas ankaŭ la duonvokalo **ŭ** (nesilaba u), prononcata same kiel la simpla mallonga **u.**

Ĉiu vokalo sola aŭ kun apude starantaj konsonantoj formas silabon. Nur la duonvokalo **ŭ** neniam sola formas silabon kaj pro tio povas stari nur post vokalo: **aŭ, eŭ, oŭ,** kaj tre rare antaŭ vokalo (en onomatopeaĵoj, uzitaj de *Zamenhof*).

Esperanto estas tielnomata "fonetika lingvo", t.e. unu litero signifas nur unu sonon kaj inverse. Tamen, ankaŭ en Esperanto, parolante pri vokaloj, ni vidas, ke ekzistas pli da sonoj ol literoj: al unu litero konformas ne malpli ol du sonoj, kiuj diferencas laŭ longeco kaj koloro.

### Akcento

En Esperanto oni ĉiam akcentas nur la antaŭlastan silabon (*radio, Afriko, ami*). Kiel jam estas dirite, la duonvokalo **ŭ** silabon ne formas (*bal**au**, bal**d**aŭ*).

Unusilabaj vortoj kutime restas sen akcento, sed ili povas ricevi logikan akcenton en la frazo (*Mi parolas ne al **vi**, sed al **ŝi***).

**Silaboj**

Ĉiu vokalo, krom la duonvokalo **ŭ** apartenas al aparta silabo. Silabojn ni disigas tiamaniere:

1. Longaj silaboj:

- ĉiuj silaboj, kiuj havas longan vokalon
- ĉiuj silaboj, kiuj havas konsonantojn post vokalo

Longaj silaboj povas esti kaj akcentataj kaj senakcentaj.

2. Mallongaj silaboj estas ĉiuj silaboj, kiuj havas mallongan vokalon post kiu sekvas alia vokalo aŭ ne pli ol unu konsonanto.

Mallongaj silaboj same povas esti akcentataj (*mia, ties*) aŭ senakcentaj (*amanta, **ku**ranto*).

**La longeco de la vokaloj**

La longeco de vokaloj dependas de la akcento. Tamen, oni devas distingi akcenton kaj longecon de vokalo. La akcento estas pli forta, pli laŭta elparolo de la silabo, do, ĝi dependas de la energio, donata al vokalo, akcentitan vokalon oni ankaŭ kutime prononcas per pli alta tono. La opozicio inter longaj kaj mallongaj vokaloj ne estas klara. Ĝi dependas ankaŭ de la rapideco de la parolo mem.

La ĉefa principo de la Esperanta prononco estas tia, ke akcentatajn silabojn oni elparolas pli longe ol senakcentajn.

Alia grava regulo de la Esperanta prononco estas, ke du akcentataj silaboj ne povas sekvi unu la alian. Do, en kunmetitaj vortoj la akcento de la unua parto malaperas, sed ĝian lokon oni markas per pli longa prononco de la pasinta akcentita silabo (*bona stato — bōnstato*).

Eblas distingi tri regulojn:

**1.** Akcentataj silaboj kutime estas longaj:

- se vokalon sekvas kelkaj konsonantoj, tio jam montras la longecon de la silabo, do la vokalo restas mallonga (*gr**a**nda, f**i**nno*), mallonga vokalo estas ankaŭ antaŭ la duonvokalo **ŭ** (*la**ŭ**do*),
- se vokalon sekvas nur unu konsonanto aŭ alia vokalo, ĝian longecon ni markas per pli longa prononcado (*a-mi, ku-**i**-ri*).



Antaŭ la afrikato **dz** vokalon oni prononcas mallonga (*edzo*). Same antaŭ **ĝ** kaj **c** ni ofte aŭdas mllongajn vokalojn (*reĝo, peco*).

Mallongigon de finaĵoj (elizion) plejparte oni uzas en poezio, tamen ĝi ne influas la akcenton kaj longecon de vokaloj (*melodio — melod**i'***).

**2.** Pronomoj, numeraloj, prepozicioj, korelativoj havas mallongan antaŭlastan vokalon, kiu ankaŭ akcentata restas mallonga (*ili, oni, mia*). Laŭ analogio oni rimarkas tendencon en dusilabaj vortoj antaŭlastan **i** prononci mallonge (*kria, fia*).

**3.** Unusilabaj vortoj havas mallongan vokalon (*jam, tuj, tri, plej*). Ili restas senakcentaj, krom logika akcento (fokuso) en la frazo. Se unusilaba vorto ricevas finaĵon kiel morfemon, ĝi iĝas akcentata (*tro — troa*). En poezio ĉiam la vokalojn de rimsilaboj oni prononcas longe.

**4.** Du akcentitaj silaboj ne povas sekvi unu la alian. Se en la vortfarado, ĉe kunmeto de du vortoj, du akcentitaj silaboj ekestas unu apud la alia, la unua perdas la akcenton. Depende de la silabo, kiu iĝis senakcenta, eblas distingi tri regulojn:

- se la dua elemento estas sufikso, la vokalo de la unua radiko iĝas mallonga (*b**a**ti — b**a**tita*),
- se la dua elemento estas vera radiko, dependas de la tradicio kaj ofteco de la kunmetaĵo. Se estas malnova kaj ofte uzata kunmetaĵo, la vokalo same iĝas mallonga (*al**i**loke*), en novaj kaj maloftaj kunmetaĵoj la vokaloj de la unua radiko ofte restas longaj, por ke la vorto mem estu pli facile komprenebla (*amv**i**vo*),
- se en kunmetita vorto du akcentataj silaboj staras aparte, oni konservas la kutiman longecon de vokaloj (*vaporbanejo*), se la nova vorto (kunmetaĵo) estas substantivo; tamen la vokalo restas mallonga, en nova vorto nesubstantiva (*faci**l**an**i**ma*).

**Vasteco de la vokaloj**

Oni devas bone distingi longecon kaj vastecon de vokaloj. Longeco estas afero de daŭrigo kaj vasteco afero de koloro de la vokalo.

En kelkaj naciaj lingvoj oni ne distingas la vastecon de la vokaloj **a, i, u**, tial ili ankaŭ en Esperanto distingas nur la longecon de tiuj vokaloj. Inverse la vastecon de **e** kaj **o** oni distingas facile. Precize pri tiuj kvar formoj oni multe diskutis.

*Zamenhof* proponis tiujn ĉi vokalojn prononci meze — nek vaste, nek malvaste. Tamen, en diversaj lingvoj ekzistas nur kaj malvasta kaj vasta formoj, kaj meza entute ne ekzistas. Tiamaniere preskaŭ al ĉiuj tio estus malfacile prononcebla. Mem *Zamenhof*, laŭ konfirmoj de samaĝuloj, prononcis sufiĉe larĝe.

*Ĉefeĉ* kreis tri regulojn:

1. La nomojn de la vokaloj oni prononcas longe kaj larĝe.
2. En malfermita silabo vokalon oni prononcas mallarĝe.
3. En fermita silabo vokalon oni prononcas larĝe.

*Wüster* priskribis tiujn ĉi vokalojn depende de la tipo de la silabo (fermita, malfermita). Tamen, tio plie montras kutimojn de parolo.

Sendube, Esperanton, same kiel ĉiujn aliajn lingvojn, oni "normigas".

Ni povas diri, ke la longeco de akcentataj vokaloj estas la plej grava eco de la Esperanta prononco. Kvankam larĝecon de vokaloj oni rimarkas, tamen ĝi entute ne influas al distingo de formoj. Eĉ, pro entute egala prononco de vokaloj la lingvo iĝus monotona, maŝina kaj malagrabla al la oreloj de aŭskultantoj. *Beaufront* iam rekomendis prononci ĉiujn vokalojn same longe, tamen la propono ne estis akceptita kaj hodiaŭ oni eĉ ne diskutas pri la afero.

Por eviti la akcentadon de ĉiu dua silabo kvazaŭ horloĝa „tik-tak-ado", ni akcentas nur la antaŭlastan silabon de veraj radikoj kaj unusilabajn enklitikojn parolate kvazaŭ forglutas.

Ne akcentitajn silabojn oni proponas entute ne atenti.

Finaĵojn oni devas prononci tre klare (nek mallongigante nek „forglutante").

## Konkludoj

Ankoraŭ en la XIV-a jarcento *Tomaso Campanella* kreis sian „Filozofian gramatikon", kaj lia samideano *Tomas Moro* pro similaj pensoj estis mortigita. Tamen, tio ne malgrandigis la volon de la homaro interparoli.

En la pasinta jarcento oni fondis komisionon (IALA), kiu devis krei principojn de ideala gramatiko. Laŭ tiuj principoj, la fonetika sistemo de Esperanto havas ununuran mankon: ĝi havas la literon **r**. Eviti tiun ĉi literon ili volis, ĉar ĝin nur malfacile prononcas infanoj kaj loĝantoj de Aziaj landoj.



La vokala sistemo de Esperanto precize respondas al la principoj de tiu ĉi komisiono: estas kvin literoj, kiuj konformas al kvin sonoj.

La fonetika sistemo de la nuntempa litova lingvo estas tre arĥaika, heredita el iu hindeŭropa pralingvo, kaj pro tio tre komplika. Esperanto havas historion de nur iomete pli ol unu jarcento kaj estas kreita laŭ principoj de logiko. Pro tio la fonetika sistemo de Esperanto estas pli simpla, pli klara kaj pli komprenebla por homoj de diversaj nacioj.

Esplorante la fonetikajn sistemojn de tiuj du lingvoj, ni vidas, ke la fonetika sistemo de la litova (t.e. nacia) lingvo estas pli komplika, pli malfacile komprenebla, tamen pli multkolora; la fonetika sistemo de Esperanto (t.e. planita) lingvo estas pli logika, pli simpla, tamen ne tiom multkolora.

Estas tre ĝoje, ke la ĉefaj principoj de Esperanto, ĝia sistemo entute ne kaŭzas konfuzojn por esprimaj ebloj.

Ke nia lingvo Esperanto estas viva kaj daŭre evoluas, ni povas konkludi el eĉ ununura fakto: en la unua vortaro estis ĉirkaŭ 900 vortradikoj, kaj en la lasta PIV pli ol 100 000. Abunda kaj diversflanka tradukita kaj originala literaturoj konfirmas la grandegajn eblojn de Esperanto en diversaj kampoj de la vivo.

**Uzita Literaturo**

1. *A. Pakerys* : *Lietuvių bendrinės kalbos fonetika*. V., 1986
2. *Z. Zinkevičius* : *Lietuvių kalbos istorinė gramatika*. V., 1980
3. *K. Kalocsay, G. Waringhien* : Plena analiza gramatiko. *Rotterdam*, 1980
4. *J. Wells* : Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. *Rotterdam*, 1978

**Adreso de la aŭtorino**

S-ino *Aida ČIŽIKAITĖ*
*– Vilniaus universiteto Kauno humanitarinis fakultetas –*
*Muitinės g. 8,*
*LT - 44280 Kaunas* / LITOVIO
<aidute@mail.lt>

**Priaŭtora informo**

En 2002 la aŭtorino bakalaŭriĝis pri litova filologio kaj en 2004 magistriĝis pri litova lingvistiko en Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF). En 2005 ŝi bakalaŭriĝis pri juro ĉe Moskva Ŝtata Industria Universitato kaj nun (en Katedro de Litova Filologio) pretigas disertacion pri "Esprimo de tempo en Esperanto: komparacia aspekto".